Erik Tantal

# Tio estas nia mondo



**Erik Tantal**

# Tio estas nia mondo

Elpensita rakonto

1-a Eldono 2023

*Kun AI-generitaj bildoj de Craiyon*

# Enhavo

Antaŭparolo....................3
Sur la lerneja korto....................4
Mediacio....................7
Pripensado....................11
En kafejo....................13
Projektsemajno....................17
Festo....................20
Diskuto....................24
Aktivuloj....................29
Rubaĵo anstataŭ vokabloj....................32
Opinioj....................35
Demandoj....................38
La ideo....................41
Komunikado....................44
Esperanto....................49
Falĉi la gazonon....................51
Amatoroj....................53
Provludo....................55
Prezentado....................59
Fontoj....................62
Rimarkoj pri Craiyon....................63
Kolofono....................64

# Antaŭparolo

La arto de fikcio konsistas en la inventado de nerealaĵoj. Sed vi inventu ilin tiaj, ke ili estiĝas realaj. [*1]

Ĉu la sekvanta elpensita rakonto povas esti nomata 'arto', mi kompreneble ne volas aserti. Tamen espero ludos grandan rolon. Tion mi ne volas nei.

Grandan dankon al la Artefarita Intelekto de Craiyon [*2] por la bildoj, kiujn ĝi generis. La krajono-simbolo kun la eta stelo en ĉiu dekstra suba angulo estas de AI.

Grandan dankon al Michael, kiuj helpis korekti la tekston.

*Erik Tantal*

## Sur la lerneja korto

Estas la dek-minuta paŭzo. Ĉiu rapidegas eksteren al la lerneja korto. Du horoj da instruado je frua lunda mateno estis verŝajne tro penigaj por kelkaj lernantoj. Nun ek al la freŝa aero! Pri kiuj novaĵoj raportos la aliaj? Kio okazis dum la semajnfino?

La knaboj de la klaso 7a rapide okupas la du tablojn por tabloteniso. Tiuj, kiuj ne povas partopreni, kunvenas antaŭ benko sub la granda kaŝtanarbo. La knabinoj preferas stari sur la kontraŭa flanko de la korto. Ili kunvenas en grupetoj de du aŭ tri.

"Ni veturis kun la tuta familio en nia terenlimozino al plaĝo. Mia patro kunportis direkteblan kajton. Tio estis bonega!", komencas Robert.

Ankaŭ Bob provas iomete fanfaroni: "Ne, tion ni ne havas. Sed mia patro permesis akompani lin sur la motorciklo. Mi sidis malantaŭ li kaj ni promene veturis tra la stratoj.

Tiel la fanfaronado daŭriĝas. Tom tute ne ŝatas tion. Dum lia semajnfino nenio okazis. Pura enuo. Tamen li ankaŭ volas kontribui ion al la rondo:

"Mi komprenas, vi tiel produktis multe da karbondioksidon. Ĉu vi ne scias, kiel malbona tio estas por nia medio?"



Tom

Nun la aliaj turnas indignajn rigardojn al Tom. Multaj kritikaj komentoj sekvas:

"Ho, ho, li devas scii."
"Mi pensas, ke li nur envias nin."
"Ja, li estas nia inteligenta suĉinfano."

Unu vorto sekvas la alian. Tom ne eltenas la vorton 'inteligenta suĉinfano' kaj puŝas sian kontraŭulon malantaŭen. Tion la aliaj verŝajne nur atendis. La gaja interbatalo komenciĝas. Tom kaj Bob montras grandajn talentojn kiel furiozaj luktistoj. Ŝajnas ke ili eĉ provas sufoki unu la alian.

"Ĉesu tuj!"

S-ro Molter, kiu hodiaŭ garde observas la lernejan korton, distiras la luktantojn. Li forte admonas ilin:

"Vi ambaŭ scias, ke ni ne torelas perforton! Hodiaŭ post la instruhoroj vi iru al la ĉambro por mediacio. Se vi ne estos tie, venos gravaj problemoj por vi!"

"Nur ne tio", ĝemas Bob, "tiam ni devas intertrakti kun la mediaciantoj el la klaso 7b. Mi pensas, ke ili estas Leona Berger kaj Eliza Koch."

"Ĉu tio estas vera? Ĉu vi konas ilin?", demandas Tom nekredeme.

"Jes, mi estis ĉe ili antaŭ du monatoj. Vi ja scias, la stulta petolo pri la biciklo de Egon. Mi tiam ellasis la aeron el lia pneŭmo", konfesas Bob, "sed, honeste dirite, la mediacio ne estas malagrabla. Vi vidos."

# Mediacio

"Saluton Bob kaj Tom, koran bonvenon al vi en nia kunveno”, bonvenigas la knabojn gaje Leona, kiu vere estas engaĝita kune kun Eliza kiel intertraktantoj. Ambaŭ trapasis la internan trejnadon de la lernejo kaj estas oficialaj mediaciantoj. Por tio ili eĉ ricevis atestilojn de la lernejestro. Ĉi tiuj estas afiŝitaj en la mediaciejo.

Bob kaj Tom bone klopodas ĝentile saluti ambaŭ knabinojn. Kaj nun sekvas la preskribita proceduro.

Eliza klarigas la regulojn por la kunveno. Ŝi demandas la knabojn, ĉu ili venis libervole aŭ ĉu ili estis senditaj de instruisto.

"Estis s-ro Müller, kiu ordonis ke ni venu", indikas Bob.

Tom miras pri Leona, kiu evidente skribas protokolon.

"Ĉu ni estas ĉi tie en polica oficejo? Kial ne simple konversacii sen striktaj reguloj?"

Leona priskribas nun kiel procedi:

"Mi esperas, ke vi ambaŭ tamen venis libervole. Estus tre bone se vi rakontas al ni, kio okazis laŭ via vidpunkto. Unu post la alia. Kaj ne uzu insultvortojn, mi petas!"

"Jes, pri tio ja temas!", plendas Tom, "Li eĉ insultis min per 'inteligenta suĉinfano'."

Bob nun rakontas kio okazis poste. Li emfazas ke Tom ĉiam estas terura grumblulo, kiu pensas ke li scias ĉion pli bone.

Eliza riproĉas lin pro la esprimo 'grumblulo' kaj demandas pri la vera enhavo de la respektiva konfrontiĝo.

Tiam komenciĝas vere fruktodona konversacio pri la temo 'ŝanĝiĝo de la klimato'. La du intertraktantoj ne povas kaŝi ke ili fakte havas la saman opinion kiel Tom. Ili forte klopodas ne montri tion tro klare, ĉar Bob intertempe fariĝas tre malĝentila.

Finfine Leona sukcesas, trankviligi Bob. Ŝi eĉ konvinkas lin ke Tom vere pravis:

"Jes, verŝajne tio estas tiel. Sed kial Tom ne parolis iomete pli diplomatie? Mi bone komprenas, ke simple kritikaĉi povas esti tre ofenda."

Tom rimarkas, ke ambaŭ knabinoj eĉ havas bonan opinion pri li. Tial li provas frue alporti la konversacion al pozitiva fino:

"Mi konfesas ke mi volis iomete kritikaĉi. Ĝenis min ja ke vi ĉiuj havis bonan semajnfinon kontraŭe al mi. Kaj mi ne  devus tuj puŝi Bob tiel."



Bob

Leona havas problemojn sufiĉe rapide skribi la protokolon.

"Atendu. Tio estas bonega. Se nun Bob ankaŭ kontribuus ion por atingi repaciĝon, ni povas tuj ellabori la kontrakton."

Ankaŭ Bob volas fini la kunvenon. Por pruvo li donas al li la manon:

"Amiko, mi nun komprenas vin pli bone. Jes vi verŝajne tute pravas rilate al la karbondioksido. Mi proponas, ke ni diskutu tion private kaj mi promesas mendi por vi malvarman kolaon."

Leona kaj Eliza tre ĝoje prezentas la preparitan kontrakton pri la interkonsentiĝo. Ambaŭ knabinoj ankaŭ premas la manojn de la knaboj. Estis sukcesa mediacio.

Forirante Tom turnas sin kaj rigardas en la direkton de la du knabinoj.

# Pripensado

Bob kaj Tom longe iras unu apud la alia senvorte. Ili forlasas la lernejan areon kaj ekiras hejmen. Post ĉirkaŭ kvin minutoj ili disiĝas.

"Ĝis morgaŭ", adiaŭas Tom.

"Atendu unu momenton. Kiam ni renkontiĝos? Mi ja volas mendi kolaon por vi."

"Jes, kial ne. Ĉu vi havos tempon hodiaŭ vespere? Ĉu je la sepa en la junulara centro? Tie estas ĉiam interese. Kaj ni povas komforte sidi en la kafejo."

"Mi konsentas. Mi tiam venos. Ĝis!"

La du kverelantoj nun disiĝas tute paceme. Bob devas daŭrigi sian vojon ankoraŭ je du kromaj stratoj. La vojo de Tom eĉ estas iomete pli longa. Kutime li biciklas, sed tio ne eblas, ĉar li bezonas novan bicikloĉenon. Lia patro estis ne helpema, ĉar li opinias, ke Tom estas sufiĉe aĝa por mem fari tion. Sed pri tiuj manlaboroj li ne havas sufiĉajn spertojn. Ĉu li petu helpon de Bob?

Tom pensas precipe pri Leona kaj Elisa. Ĉu ili postrigardis lin, kiam li eliris la ĉambron?

Efektive domaĝe, ke la mediacio iris tiel rapide, li pensas. Kial li ne estis pli batalema? Tiam necesus havi plian kunvenon pri disputsolvado.

Li ŝatus denove paroli kun Leona. Ŝi ankaŭ havis la saman opinion kiel li. Karbondioksido, klimato, medio. Tiujn temojn ŝi certe ŝatus. Sed kiamaniere alproksimigi ŝin? Tom planas paroli pri tio kun Bob. Povas ja esti ke li havas bonan ideon.

Ankaŭ Bob havas multon en sia menso. La rilatoj al Tom ne estas malbonaj. Kaj li estas talenta lernanto en la fakoj matematiko kaj natursciencoj. Ĉu li demandu lin pro helpo pri malfacilaj hejmtaskoj? Bob metas la slipon kun la skemo pri fotosintezo en sian poŝon, antaŭ ol li ekiras al la junulara centro.

# En kafejo

"Mi jam delonge ne estis ĉi tie", mencias Bob. Li prenas lokon apud Tom, kiu jam sidas ĉe la tablo apud la fenestro.

"Kaj, kie estas nun la kolao? Promeso estas promeso", postulas Tom.

"Ne zorgu. Mi tuj mendos ĝin. Kun aŭ sen sukero?"

"Ne gravas. Gravas nur ke vi perdas vian monon. Mi aĉetas kelkajn nuksojn."

Ambaŭ daŭrigas la ŝercan konversacion. Finfine Tom fariĝas pli serioza.

"Dankon por la trinkaĵo, Bob. Nun mi devas trakti tute alian temon. Ĉu vi kapablas ripari biciklojn? Mia biciklo ja bezonas novan ĉenon."

Bob ĝojas. Li timis ke Tom denove atakus lin pro la kvereloj sur la lerneja korto.

"Kompreneble, jes, mi povas helpi. Sed nur se vi de tempo al tempo subtenas min fari miajn lernejajn taskojn. Aktuale mi havas grandajn problemojn kun tia aĉa tasko pri la fotosintezo."

Nun la komunikado pli bone funkcias. Ambaŭ rimarkas, ke ankaŭ la alia havas problemojn. Do, kunlaborado ne estos malutila. Kaj la mediacio ne plu estos temo.

Tom volas paroli pri la du knabinoj, sed li ne scias kiel. Temas ja pri liaj propraj sentoj. Tial li provas unue klarigi la taskon pri la fotosintezo. Tio ne bone funkcias, ĉar li ne povas koncentriĝi. Ne estas pro la laŭta muziko.

Estas Eliza kaj Leona pri kiuj li pensas.

"Ne gravas, ni solvos la taskon morgaŭ. La limdato estos nur venontsemajne", trankviligas lin Bob.

En tiu momento la pordo malfermiĝas kaj du knabinoj eksidiĝas ĉe la najbara tablo. Vere! Estas Eliza kaj Leona.

"Mi ne povas kredi tion!", vokas Bob, "Ĉu tio nun estas daŭriĝo de la mediacio?"

Eliza kaj Leona kontente ridetas.

"Ne, ne, estas pura hazardo. Tiu loko ne taŭgas por tiaj aferoj."

"Kial vi ne sidiĝas ĉe nia tablo? Bob certe aĉetas kolaon por vi", proponas Tom.





Leona & Eliza

Eliza rifuzas tion: "Ne, ne. Ne timu. Ni mem zorgas pri niaj trinkaĵoj. Sed ni prenos lokon ĉe via tablo."

Tom ĝoje eksaltas kaj puŝas la seĝojn en ĝustan pozicion.

"Kiel tio okazas? Ĉu vi ofte venas ĉi tien?", li demandas ekcitite kaj ofertas al ili nuksojn.

Leona ridetas: "Koran dankon. Sed mi preferas veganan fruktan ĵeleon. Bedaŭrinde ĝi ne estas havebla ĉi tie."

Jes, ŝi ŝatas Tom. Sed tio validas ankaŭ por Bob. Ŝi iomete nedecideme rigardas al Eliza. Kiel ŝi reagas dum la neatendita kunveno?

Ankaŭ Eliza surpriziĝas. Ŝi tuj profundiĝas en konversacio kun Bob. Tial Leona devas babili kun Tom.

"Ni regule venas ĉi tien. Kompreneble ni havas sufiĉajn temojn pro la mediacio. Kaj ni atendas la alvenon de Briana. Ŝi estas en la 11a klaso kaj ĉiam renkontiĝas kun ni ĵaude."

Briana kunvenigis en sia lernejo etan grupon de aktivaj lernantoj. Ŝi planas instali laborgrupon pri mediaj aferoj. Ŝia ideo estas ke iam poste ŝi povas engaĝiĝi politike por tiuj temoj.

Do, la grupo hodiaŭ pligrandiĝis al kvin. Tom kaj Bob senprobleme partoprenas ankaŭ en la planado. Kaj en la venonta semajno jam estos la sekvanta kunveno.

# Projektsemajno

Granda homamaso staras en la enirejo de la lernejo. Ĉiuj scivole studas informojn sur ekrano, kiuj diskonigas la horaron por la venonta projektsemajno. Estas tiom da ofertoj!

Kiu devas elekti, tiu estas en granda embaraso.

Foto-kurso, klakdancado, muzikteatraĵo, abelbredado, riparado de bicikloj, desegnado de bildstrioj, kaj multaj aliaj. Kelkajn projektojn ekzemple pri ekologiaj temoj, pri historio kaj modo-dezajno ofertas ankaŭ lernantoj de la altrangaj klasoj.

"Vi elektu la kurson pri la riparado de bicikloj, Tom", proponas Bob. Sed li ne ricevas konsenton, ĉar Tom jam faris sian decidon. Media protekto, gvidota de Briana. Ĉi tie certe ankaŭ partoprenus Eliza kaj Leona. Do, neniu alia projekto eblas por li.

"Kion vi pensas, ĉu mi demandu Robert?", demandas Tom, "Eventuale li volas ankaŭ partopreni. Tio estus interesa, mi pensas. Riparado de bicikloj estas temo por vi ĉar vi jam estas eksperto pri tio."

Bob subtenas la proponon pri la partopreno de Robert: "La venontan horon estas jam la unua kunveno por projektgrupoj. Lasu ankaŭ lin veni. Ĝis poste!"

Kunveno preskaŭ kiel en la kafejo de la junulara centro. Kune kun Briana ĉeestas ses. Robert estis persvadita ankaŭ partopreni.



Robert

“Tute ne gravas.”, opinias Briana. "Oni povas pli bone labori en malgrandaj grupoj. Kaj ni volas labori, ĉu ne?”

Poste ŝi prezentas sian programon por la venonta semajno.

Unue ĉiuj devos informi sin pri aktualaj mediaj problemoj. Poste la grupo kolektas ĉiujn trovitajn informojn por komune diskuti ilin.

Kiel antaŭzorgo Briana rezervis por la unua tago la komputilan ĉambron. Je la sekva tago oni plu prilaboros la kolektitajn informojn. Se post tio estos tempo, ĉiuj povos spekti kaj pridiskuti filmon pri plasta poluo en la oceanoj.

La sekvantan tagon estos ekskurso al kloakaĵ-purigejo. Kaj la antaŭlastan tagon la grupo preparos detalan prezentadon pri la traktitaj temoj. Por tio estas tri grandaj tabulegoj por bildoj kaj tekstoj. Je la lasta tago okazos la tiel nomita 'Tago de malfermitaj pordoj'. Tiam venos posttagmeze gepatroj kaj geavoj por vidi, kion faris iliaj infanoj dum la tuta semajno.



Briana

## Festo

Denove lundo. Denove normala instruado. Neniu vorto pri la projektsemajno en la leciono pri matematiko. Post du instruhoroj venas dek-minuta paŭzo. Ĉiuj rapidegas eksteren al la korto. Jam komenciĝas la fanfaronaj prezentadoj en grupo de la knaboj sub la kaŝtanarbo. Ĉiu evidente partoprenis pli bonan projekton ol la alia.

Tio ĉifoje ne estas interesa por Tom. Li apartigas sin de la grupo kaj iras penseme tien kaj reen. Kiam nur estos denove ĵaudo!

Je la kontraŭa flanko de la korto kunvenas la knabinoj. Subite Leona rapidegas al la kaŝtanarbo vokante al Tom:

"Hodiaŭ vespere ni renkontiĝos ĉe Briana. Tie estos eta festo. Ankaŭ la tuta projektgrupo estas invitata."

"Dankon, mi nun scias. Mi informas la aliajn", respondas Tom. Li ŝatus plu paroli kun Leona, sed ŝi tuj malaperas.

Li tuj informas Bob kaj Robert. Ili ĝojas pro la invito. Bob promesas alporti kelkajn sakojn da arakidaj flokoj kaj nuksoj. Kun  granda rido li diras al Tom:

"Verŝajne vi devas aĉeti du bukedojn da ruĝaj rozoj. Unu por Briana, unu por Leona, ĉu ne?"

Ĉar kompreneble li rimarkis, kiom forte Tom ĝojas pri la festo al kiu ankaŭ Leona venos.

"Ĉesu moki min. Aŭ ĉu vi preferas denove iri al la mediacio?", kontraŭas Tom rapidspirite.

Tom ne planas aĉeti florojn. Tamen li pripensas kiel li povas impresi Leona. Li ne parolas pri tio. Sed li rememoras ke Leona iam menciis veganan frukto-ĵeleon. Tion li volas aĉeti kaj kunpreni por ŝi. Do, antaŭ la festo li devas ankoraŭ iri al superbazaro.

"Kial vi jam nun ekas? La festo estos ja nur je la vespero", demandas lia patrino. Ŝi kompreneble ne scias, kion ŝia filo en tiu momento havas en la menso.

La loĝejo de Briana estas en la apudeco. Tom eĉ ne bezonas la biciklon. Li multe tro frue atingas la domon, sed ne kuraĝas eniri. Sur la trotuaro li pasumas tien kaj reen kaj atendas la alvenon de la aliaj. Malproksime, ĉe la vojkruciĝo li vidas grandan grupon, kiu alproksimiĝas malrapide. Estas la lernantoj el la 11a klaso, kiujn Briana ankaŭ invitis.

Tom ne sentas sin tute komforte. Kiel li sintenu? Li estas ja nur en la 7a klaso, kaj ĉe la festoj estos multaj pli aĝaj partoprenantoj. Tial li forturnas sin kaj lasas ilin preterpasi. Finfine venas liaj kamaradoj. Kune kun ili li sentas sin pli bone kaj nun ankaŭ eniras la domon de Briana.

Briana preskaŭ tute malplenigis la grandan loĝĉambron. Ŝiaj gepatroj forveturis al parencoj por kelkaj tagoj. Tiel nun estas libera spaco por ilia filino. Tabloj kaj seĝoj ne plu estas en la loĝĉambro. Anstataŭe troviĝas kelkaj kestoj kaj benkoj. En angulo staras la provizo da trinkaĵoj.

"Estas nur boteloj kaj ladskatoloj, neniuj glasoj", klarigas Briana. Tial neniu devas poste zorgi pri vazlavado. Muzikon prezentas la frato de Briana. Estas jam sufiĉe laŭta. Speciale, ĉar ĉiu parolas samtempe. La salono ne havas pordon, ĝi kondukas al larĝa koridoro. De tie oni atingas kuirejon kaj la necesejon.  La aliaj ĉambroj estas tabuaj hodiaŭ, emfazas Briana kaj deziras multan ĝojon al ĉiuj vizitantoj.

En la koridoro la lernantoj el la 7a klaso kaŭras kune sur la planko. Tiel preskaŭ ne estas kontaktoj inter junaj kaj pli aĝaj vizitantoj. La lernantoj el la 11a klaso plejparte staras kaj babilas kun siaj samklasanoj.

Briana provas almenaŭ iomete paroli kun kiel eble plej multaj homoj. Sed pro la nombro da vizitantoj kaj la granda bruo tio kompreneble ne estas facila afero. Post kelkaj provoj ŝi rezignas kaj petas sian fraton forŝalti la muzikon por unu momento.

"Ĉiu aŭskultu nun!", ŝi vokas aldonante, "Vi povas ankaŭ iri en la ĝardenon. Tie ja estas bona aero. Sed restu sur la teraso aŭ sidiĝu sur la ĝardenaj seĝoj."

"Tio estas bona ideo. Kiu venas kun mi eksteren?", demandas Tom, prenas ladskatolon da kolao kaj ekiras. Iom post iom ankaŭ venas Bob, Robert, Leona kaj Eliza. Sur la teraso vere estas pli bone ol en la domo. Kaj, kio estas eĉ pli grava: Tom sidas sur ĝardena seĝo rekte apud Leona.

# Diskuto

Briana pensas, ke dum la hodiaŭa kunveno en la junulara centro okazos detala diskuto. Ĉu la partoprenantoj de la projektsemajno estis kontentaj? Ĉu ekzistas sufiĉa intereso por plua laboro pri la traktitaj temoj? Ĉu eventuale aliaj fokusoj estus pli bone? Tiuj estas kelkaj de la demandoj, kiuj certe devas esti pridiskutataj.

"Saluton Briana, vi estas hodiaŭ vere tre akurata. Unue multan dankon pro via invito. Estis tre bona festo. Ĉu vi jam ordigis kaj purigis vian loĝejon?", demandas Eliza.

"Mi havas ankoraŭ tempon. Miaj gepatroj nur venos postmorgaŭ. Mi ĝojas, ke vi ŝatis la feston."

Nun la aliaj alvenas. Ankaŭ ili diras 'dankon' al Briana. Bob eĉ proponas organizi barbekuan feston por la ĵaŭda grupo. Li jam parolis kun siaj gepatroj. Ili permesus tion.

Ĉiuj ĝoje aplaŭdas kaj Briana rimarkas, ke ŝi ne plu bezonas trakti la pripensitan unuan demandon. Tial ŝi tuj aldonas:

"Bonege, tiam mi supozas, ke nia eta grupo daŭriĝos, ĉu ne?"

"Kompreneble estas daŭriĝo, sed ĉu ni ne devas iomete diskuti? Mi havas ankoraŭ kelkajn demandojn. Ekzemple pli plasta rubaĵo", rimarkas Bob.

"Jes, pri tio mi ŝatus ankaŭ diri ion. Ĉiu ja komprenas, ke estas bonege, se ni ĉiuj havas kiel eble plej malmulte da plasto. Sed la efiko estas ja minimuma, ĉar aliaj landoj ne zorgas pri evitado de plasto", notas Robert.

"Ili ofte faras pli ol ni!", diras Eliza.

"Mi ne scias, kial ni diskutas tion. Plasta rubaĵo estas bona materialo por fari ion ajn. Oni devas nur ĝuste recikli."

"Tio ne estas tiel facile. Ofte la rezulto ne estas tiom bone!"

Nun aperas multaj demandoj kaj komentoj. Briana devas interveni nun:

"Tio estas ja nur unu temo. Vi ja pravas. Sur tiu kampo devas esti farita multe. Kaj tio validas ankaŭ por la aliaj temoj. Kion vi pensas, Tom?"

"Mi havas tute aliajn pensojn", opinias Tom, "jes, ni ĉiuj devas zorgi pri la medio. Sed kiel? Estas ja neniu progreso se ni nur babilas. Ĉu ni agadu kiel la aktivistoj kiuj algluiĝas sin per la manoj sur la asfalto de la strato kaj tiel blokas la tutan trafikon?"

"Kia stulta agado! Tio certe doloras, se la manoj estas algluitaj sur la asfalto", notas Leona.

"Mi pledas ke oni simple lasu ilin tie, kie ili algluiĝis. Iam ili ja devas iri al la necesejo. Kial okupi la policon pri tiaj aferoj?"

"Vi estas malica, Bob. Mi komprenas tiujn homojn. Ili vere aktiviĝas por la klimato", emfazas Robert.

Nun la diskuto iĝas vere vigla. Multaj aliaj problemoj de la medio kaj la agadoj estas traktataj. Je la fino de la kunveno Tom neatendite atentigas la ĉeestantojn pri tute alia temo.

"Mi ne komprenas, kion vi volas. Ni ĉiuj ja vivas ĉi tie en vere bonaj ĉirkonstancoj kaj krome ni ĉiuj klopodas ĉiam plibonigi la medion. Sed miaopinie estus pli grava, iam fari ion kontraŭ la militoj, kiuj multas en nia mondo!"

Nun ne plu estas tempo trakti tiun temon.

La jununarcentro estas malfermita nur ĝis la naŭa posttagmeze. La grupo estus deziranta diskuti plu. Ekstere, antaŭ la domo ĉiuj adiaŭas. Robert kaj Briana ekbiciklas. Je la alia flanko de la strato atendas la patro de Leona. Li volas veturigi sian filinon hejmen per aŭto.

"Ho, tio estas bonege, Paĉjo. Ĉu ankaŭ miaj amikoj rajtas kunveturi? Nur ĝis la kruciĝo ĉe la sportejo. Ĝis tie niaj vojoj samas."

"Konsentite, nur eniru. Sed estas iomete malvasta ĉi tie."

Tom kaj Bob sin premegas apud Eliza sur la malantaŭa benko. Leona sidas antaŭe, apud sia patro.

Tom ĝentile diras: "Grandan dankon, s-ro Berger, pro lasi nin kunveturi."

"Ho, ho, kaj vi ne faris stultaĵojn en la junulara centro? Vi certe ne fumis, ĉu ne?"

"Neniam, neniel", konfirmas Bob, "por tio ni ja ne havas monon."

"Ja, tio estas bone. Nu, se vi volas, se vi havas tempon, venu al mi por falĉi la gazonon. Per tio vi povus altigi vian budĝeton. Sed neniam fumu!"



S-ro Berger

Tion Tom ne atendis. Tia alloga oferto! Kaj Tom eĉ ne pensas pri la mono.

Post alveninte hejme li tuj malaperas en sian ĉambron. Li devas ankoraŭ finprepari kelkajn taskojn por la lernejo.

"Nur ne tro longe laboru! Vi devas ja ellitiĝi frue", admonas lin lia patrino.

# Aktivuloj

Briana pripensas la lastan kunvenon en la junulara centro. Ŝi ne imagis ke tiuj lernantoj povas kunlabori tiel interesoplene. Tio signifas nun por ŝi ekstrajn klopodojn. Ŝi bezonas pli da informoj, ne nur pri la klimato-aktivuloj. Ŝi trovas taŭgajn resumojn ĉe Vikipedio. Tiam ŝi limigas sian esploron al la grupoj 'Fridays for Future' (vendredoj por futuro), 'Extinction Rebellion' (rebelo kontraŭ formorto) kaj 'Letzte Generation' (lasta generacio).

En la jaro 2018 la sveda lernantino Greta Thunberg komencis la 'lernejan strikon por la klimato'. En multaj landoj lernantoj organizis similajn agadojn. Oni diras ke nur unu jaron poste 1,8 milionoj da homoj partoprenis la unuan mondvastan strikon por la klimato.

La radikala ekologia movado 'Extinction Rebellion' fondiĝis ankaŭ en 2018. Ĝi celas malhelpi la klimatan katastrofon. Por atingi tion ĝi faras kampanjojn kun civila malobeo, ekzemple blokadoj de stratoj kaj havenoj.

La grupo 'Lasta generacio' fondiĝis en la jaro 2012 post la spektakla malsatstriko por la klimato, kiu okazis en Berlino. Sep junaj homoj provis devigi la

politikistojn, kunvoki civitanan konsilantaron. Tiu devus diskuti tujajn agadojn kontraŭ la klimata krizo. La grupo ne sukcesis realigi tiun postulon. Sed nun la grupo altiras atenton kiam iliaj aktivuloj algluigas sin sur la stratoj.

Rilata al aktivuloj por la paco Briana rimarkas, ke ne estas facile ricevi bonan superrigardon al tiu temo. Ŝi legas ion pri marŝoj dum Pasko, pri tagoj kontraŭ milito, pri biciklaj karavanoj por la paco, ĉenoj el homoj kaj multaj alvokoj al manifestacioj. Sed evidentiĝas, ke ĉi tie ne estas tiom multe da aktivuloj ol ĉe la ekologiaj grupoj.



Manifestacio

Ŝi miras pro la fakto, ke dum 2022 la nombro de la mortigitaj homoj en militoj preskaŭ duobliĝis. La plej alta nombro (pli ol 100 000) estas reportita de la milito en Etiopo [*3].

Kiom da sufero! Kiel tio eblas? Kiom da mono oni elspezas por tio? Kaj tiam aliaj devas suferi pro manko. Tiamaniere ne eblas forigi la mondvastan malsaton! Kaj restas tro malmultaj rimedoj por efektive batali kontraŭ la klimata krizo.



Domo trafita de bombo

Briana devas konfesi ke Tom vere bone atentigis la grupon pri grava problemo. Ne sufiĉas esti nur aktiva sur la kampo de la ekologio.

# Rubaĵo anstataŭ vokabloj

"Kia stultaĵo! Hodiaŭ ni devas purigi la urbon", grumblaĉas Robert. Bob ankaŭ plendas.

"Kial ni estas tiuj, kiuj devas forigi la rubaĵojn de la aliaj?"

Tom kontraŭdiras: "Tio estas pli bone ol matematiko kaj vokabloj, ĉu ne? Kaj poste ni ĉiuj povas rakonti ion. Povas ja esti, ke nia lernejo gajnas la premion de la urba rubokolekta firmao! Tiam nia lerneja korto finfine ricevas novajn platojn por tabloteniso."

Du dungitoj de la firmao por rubokolekto staras post la tria instruhoro sur la korto kaj disdonas gantojn, sitelojn kaj sakojn al la lernantoj de la klasoj 7 ĝis 9. Ili hodiaŭ ne plu bezonas lerni en la klasĉambro.



Urba rubokolekto

Unu de la dungitoj donas ankoraŭ kelkajn informojn pri la hodiaŭa agado:

"En la unua horo post tagmezo reiru ĉi tien! Tiam ni kolektas vian trovitan rubaĵon. Ni pesas la sakojn kaj notas la kvantojn. La klaso, kiu alportas la plej multon, ricevos premion. Ĝi estos invitata viziti nian centralon en la venonta monato. Ĉio okazos dum la lerneja tempo, kompreneble. Kaj, memoru! Vi devas ĉiam iri en grupoj, neniam sole! Minimume po tri ĝis kvar lernantoj en grupo!"

La klasreprezantoj prenas la mapojn, kiuj montras la najbaraĵon. Sur tiuj la areoj por la klasoj estas markitaj en diversaj koloroj. La lernantoj devas kolekti botelojn, ladajn kaj kartonajn skatolojn, kaj alian restan rubaĵon kiel ĉokolado-papero, paperaj naztukoj, botelĉapoj k.t.p.

Ek! Tom, Bob kaj Robert kune laboras. Ili havas la areon ĉe la ĉefa strato inter du bushaltejoj. Al tio ankaŭ apartenas la najbaraj terpecoj, kiuj estas la unuaj partoj de la flankaj stratoj, la eta parko kaj la ludejo.

Bob ekhavas la ideon fari fotojn de tiuj areoj, kie troviĝas vere multaj rubaĵoj. Ĉie estas cigaredo-stumpoj, precipe ĉe la bushaltejoj.

"Tiel aspektas nia mondo! Mi tute ne komprenas tion. Estas ja sufiĉe da ruĝaj rubujoj. Kial la homoj ne uzas tiujn?", demandas Robert.

"Oni devus kapti ilin en la ago kaj lasi ilin pagi grandan monsumon kiel punon!"

"Vi pravas, sed kiu kontrolus tion?"

Post iom da tempo la siteloj pleniĝas. Eĉ malnova gimnastikŝuo kaj putriĝinta ĵako estas tirataj el la arbustoj. Nun la unua sako estas plena. Tom demetas ĝin apud la parka benko.

"Ni kunprenos ĝin je la reiro. Fiksu al ĝi la afiŝon kun nia grupa numero. Estas ja nia klaso kiu devas gajni la premion", emfazas Tom.

Sed por tio la trovita kvanto ne sufiĉas. Ĉifoje gajnas la klaso 7b. Leona rajtas akcepti la atestilon. Ŝi staras en la mezo de sia klaso kaj fiere prezentas ĝin por la klasa foto.

# Opinioj

"Saluton Briana, ĉu mi estas ĝustatempe?"

"Jes, Ingo. Mi ĝojas ke vi venis hodiaŭ. Nun ni estas minimume sep."

"Ne, ni estas ok. Mi aŭdis ke ankaŭ Birgit volas veni."

Briana demandis sian klason, kiu ŝatus veni hodiaŭ al la junulara centro. Do, ŝi nun varbis du pliajn homojn.

"Ni kunpuŝas du tablojn. Tio estos ĝusta konferenca tablo", proponas Bob. Li ankaŭ movas la seĝojn.

La kunsido komenciĝas. Briana unue prezentas Ingo kaj Birgit. Tiam ŝi rakontas iomete pri sia eta konversacia rondo, kiu fondiĝis post la lasta projektsemajno por regule kunveni je la ĵaŭda vespero.

Nun ŝi reprenas la diskuton de la lasta renkontiĝo kaj parolas pri la kontribuo de Tom.

"Lastan fojon li alportis tute novan temon. Antaŭe ni preskaŭ ĉiam nur parolis pri la protekto de la medio. Sed mi pensas, ke Tom atentigis nin pri io tre grava."

Ŝi aldonas: "Li indikas, ke ĝuste en nia tempo, ni devas ankaŭ konsideri la temon 'militoj'. Kial? Kion vi pensas?"

"Ĉu utilas, ke ni purigas niajn stratojn kaj en aliaj landoj mortas la homoj en militoj?"

"Jes, kaj ĉiam pli da homoj devas fuĝi."

"Mi pensas ke la temo 'militoj' pli gravas ol media poluado."

Nun estas ankoraŭ multaj petoj kaj Briana devas denovi interveni.

"Ja, ĉi tio vere estas terura. Sed kion fari?"

"Simple ne plu sendi armilojn al la landoj, kie okazas milito. Ho, ne, detruu ĉiujn armilojn!", postulas Leona laŭte.

"Nur, se tio estus tiel simple. La armila industrio ja gajnas multe da mono kaj multaj homoj laboras en la fabrikoj kaj tiel perlaboras sian vivon. Kiel vi volas malebligi tion?", demandas Eliza.

"Mi ne scias, kiel vi pensas. Mi mem sentus grandan nesekurecon se mi promenus tra la praarbaro sen armilo. Ĉu vi ne konsentas, ke armiloj necesas por defendi sin?",  demandas Robert.

Tom replikas: "Jes, vi pravas, sed en milito la kreskanta provizo da armiloj kaŭzas ĉiam pli da mortigitaj homoj nome sur ambaŭ flankoj de la fronto. Ĉu tiam ne estus pli bone instigi la batalantojn interkonsenti pri la batalhalto. Kaj tiam ĝuste konferenci ?"

"Jes, tion ni ja ankaŭ faras en nia lernejo. Ni havas lernantojn, kiuj estas trejnitaj por solvi disputojn. Ĉu la najbaraj landoj de la batalantoj ne povus agi kiel mediaciantoj?", proponas Eliza.

"Tion jam faras multaj, sed aliaj kontraŭas. Niaj politikistoj ja ankaŭ havas diversajn opiniojn, kaj estis ni, kiuj elektis ilin", notas Ingo.

Nun Tom fariĝas pli kaj pli maltrankvila:

"Kaj nun ili faras kion ili volas. Antaŭ la elekto ili promesas ĉion kaj post la elekto ili forgesis tion rapide."

"Sed kion fari?", ripetas Briana.

# Demandoj

Multaj demandoj, multaj opinioj. Neniu solvo videblas. Tom kaj Bob nekontente hejmeniras. Ankaŭ Briana ekkomprenas, ke ŝi partoprenis interesan diskuton, sed ne scias kiel procedi nun. Antaŭ la pordo staras ankoraŭ Ingo. Li volas iomete daŭrigi la konversacion kun Briana.

"Mi miras, ke tiuj junuloj povas diskuti kun vi tiel bone. Se mi parolas kun miaj samklasanoj pri tiuj temoj subite aperas stultaj rimarkoj. Diversaj opinioj ofte ne estas permesitaj."

"Ja, vi pravas, Ingo. Tion mi ankaŭ rimarkis. Mi pensas ke multaj homoj preferas eviti tiujn temojn. Ili ne volas havi konfliktojn."



Ingo

"Jes, sed tiamaniere oni ne atingas solvojn. Ĉio restas tiel kiel ĝi estas. Ni devas elpensi ion novan. Sed hodiaŭ jam estas tro malfrue. Mi esperas, ke vi venas denove ankaŭ la venontan fojon."

Ankaŭ Eliza kaj Leona daŭrigas la diskuton en la aŭto de la patro de Leona. Li partoprenas la konversacion:

"Ŝajnas, ke hodiaŭ estis interesa kunveno, ĉu ne?"

"Jes, Paĉjo. Kion vi pensas? Kiel oni povas igi la politikistojn fari pli por la paco?", demandas Leona.

"Ho, ho, mia filino ŝatas iĝi kanceliero, ha, ha, ha. Nun, ja. Mi ne kontraŭus se vi ne fiksas viajn manojn per gluo sur la asfalto de la stratoj. Tiam, kial ne?"

Eliza aldonas: "Sed tiu homoj ricevis tre bonan atenton. Sed ni estas tro malgranda grupo. Kion ni povas fari?"

"Ha,ha, ha. Vi povus ja fiksi viajn pugojn sur la strato. Ne, ne, tio nur estis ŝerco", reprenas la patro de Leona.

Do, sincera konversacio hodiaŭ ne plu eblas.

"Dankon, s-ro Berger pro la taksi-veturado. Kial vi ne ankaŭ venas kun ni al la junulara centro?"

Per tiuj vortoj ŝi adiaŭas sin. Kompreneble ŝi scias ke la patro de Leona certe ne havas tempon aŭ emon por tio.

Robert ruligas sian biciklon malrapide de sur la monteto. En lia kapo la diskuto daŭras. Li imagas ke la venontan fojon eĉ pli da partoprenantoj ĉeestas. Ĉu li krome varbu en la najbaraj klasoj? Povas ja esti ke tie ankaŭ troviĝas prudentaj uloj? En la junulara centro eblas ne nur ripozi kaj ludi tablotenison.

Robert devas denove forte pedali ĉar la vojo nun supreniras. Post tiu peno li estas hejme. Ankoraŭ kontroli la matematik-kajeron, ĉar morgaŭ estos la granda matematika testo.

# La ideo

En la klaso 11 Ingo estas demandita, kial li ne estis ĉe la piedpilka evento je la hieraŭa vespero.

"Nun ja, hieraŭ mi estis en la junulara centro kune kun Briana."

"Vere? Ĉu vi ĉiam ankoraŭ ludas tablotenison? Sed Briana ĉiam malvenkas."

"Ne, tio ne estis tiel. Ni partoprenis etan diskutrondon pri la temo 'milito'.

"Ĉu vi planas organizi manifestacion por la paco?  Ne kun mi. Tio ne havos sukceson. Ni ĉi tie manifestacias kaj la alia flanko nur ridas kaj gaje daŭrigas la batalon."

Ingo devas konfesi, ke ankaŭ li iam pensis pri la ideo 'manifestacio'.

"Jes, vi pravas. Oni devus mondvaste manifestacii, kaj je ambaŭ flankoj de la fronto. Sed kiel oni devas fari tion?"

Samklasano Bernd opinias: "Neniam estos sukceso ĉi tie ĉar estas preskaŭ nenia komunikado inter la

malamikaj popoloj. Kaj ĉiam la alia estas la vera kulpulo. Neniam oni parolas kun tiaj krimuloj."

Ingo pripenseme sidiĝas. Post du minutoj komenciĝas la leciono pri angla lingvo. Kiel li nur povas koncentriĝi? Dum la venonta paŭzo li planas paroli kun Briana, sed antaŭ tio estas la instruhoro pri historio.

Hodiaŭ temas pri propagando kaj la bildigo de la malamiko en la nazia tempo. S-rino Garms, la instruistino por historio, citas kelkajn karakterizaĵojn, kiujn nomis la historiisto Kurt Spillmann:

Malkonfido: "Ĉio, kio venas de la malamiko, estas aŭ malbona aŭ iĝis el malhonestaj motivoj, eĉ se ĝi ŝajnas racia."

Asigno de la kulpo: "La malamiko kulpas pri la nuna stato de streĉiĝo aŭ pri tio, kio en la regantaj cirkonstancoj estas negativa por ni."

Egaligo kun la malbono: "La malamiko enkorpiĝas en ĉio la malon de tio, kio ni estas kaj ke ni alstrebas. Li volas detrui niajn plej altajn valorojn. Tial li devas esti detruita mem." [*4]

Tio venas el la pasinteco, sed Ingo trovas ĝin tre aktuala.

S-ro Garms daŭrigas la paroladon: "Kroma ilo de la nazia diktaturo estis la malpermeso aŭskulti radiostaciojn de la malamiko."

"Ankaŭ en la eksa GDR la ŝtato provis agi kontraŭ la konsumado de okcidentaj amaskomunikiloj, ĉu ne?", notas lernantino.

"Kaj hodiaŭ ĉe ni?", demandas Ingo.

Nun s-ro Garms komencas ŝviti:

"Nu, ja, se niaj elsendaĵoj estas malpermesitaj en la eksterlando, ni ankaŭ rajtas bloki sendaĵojn. Tiamaniere ni protektas nian loĝantaron kontraŭ falsaj novaĵoj kaj propagando."

Ingo ne estas konvinkata. Evidentiĝas ke en tiaj tempo ĉiuj normalaj kontaktoj inter homoj el diversaj sistemoj estas subpremataj.

Li devas trovi la eliron. Temas pri la komunikado inter la homoj!

## Komunikado

"Ĉu vi povas demandi viajn junajn amikojn, ĉu ili venos venontan dimanĉon por falĉi la gazonon?", demandas s-ro Berger sian filinon Leona.

Ŝi klerigas sian patron: "Paĉjo, dimanĉe falĉi la gazonon per maŝino estas malpermesita. Tion scias ĉiu! Sed vi povus ja demandi viajn najbarojn. Eventuale ili ja ne ĝenas."

"Mi ne parolas kun tiuj homoj. Ili molestas min ĉiam per siaj du hundaĉoj. Kaj la aliaj turmentas min per siaj kriantaj infanoj. Mi certe ne demandas. Ili povas ja plendi, se ili volas!"

"Ĉu miaj amikoj povas veni ankaŭ sabate?"

"Jes, bone, sed nur post la 11-a. Antaŭ tio mi ja volas trankvile matenmanĝi sur la teraso."

"Hodiaŭ mi renkontiĝos kun ambaŭ. Tiam mi informos ilin", promesas Leona.

La konduto de ŝia patro ĉagrenas ŝin. La infanoj de la najbaroj estas tre ĉarmaj, ŝi pensas. Ankaŭ la hundojn ŝi ŝatas. Leona tute ne komprenas kial ŝia patro estas

tiel sentema. Verŝajne iam en la pasinteco okazis io malbona.

En la junulara centro kunvenas ĉiu kiel kutime. Ingo estas akompanata de du samklasanoj. Do, iom post iom la grupo pligrandiĝas.

Ingo tuj startas la kunvenon: "Mi pensas scii, kion ni devas priparoli dum la sekvanta tempo."

"Kio? Ĉu ni eku por manifestacio? Pri tio mi ne havas deziron", kritaĉas Bob.

"Atendu. Ingo ankoraŭ ne estas finita. Li unue klarigu tion", trankviligas lin Briana.

"Jes, je la lasta kunveno estis ankoraŭ multaj demandoj. Neniu ekzakte sciis la celon. Ni nur komprenis unu ideon. Ni nepre devas fari ion kontraŭ la militoj! Kaj mi pensas ke tio nur funkcias, kiam ni plibonigas la komunikadon inter la homoj."

"Kion tio signifas? Komunikado? Kial tio? Denove nova temo?", demandas Bob skeptike.

Ingo daŭrigas sian klarigon. Li rakontas pri la instruhoroj en la fako 'historio', de la nazia tempo en

Germanio. Tiam ekzistis precipe multe da malamo inter la homoj.

"Tiam la ŝtato regis la komunikadkanalojn kompreneble por plifortigi la aĉan bildigon de la malamiko. Kaj ĉiuj rilatoj inter la homoj de 'nia popolo' kaj la aliaj, kiuj estis klasifikitaj kiel malamikoj, estis rompitaj."

"Jes, vi pravas. Sed hodiaŭ la situacio estas ofte simila. Ĉu vi ne aŭdis, ke kelkaj sportistoj ne rajtis partopreni internaciajn turnirojn? Ili apartenis al la malamika lando. Ne gravis, ke ili fakte havis nenion komunan kun la militaj agadoj", notas Briana.

"Kaj la sama afero estas la detruo de urbaj ĝemeliĝoj. Mi tion ne komprenas. Sur ĉiu flanko ekzistas prudentaj homoj. Sed nun malaperas ĉiuj ŝancoj por interkomunikado", aldonas Ingo.

Briana rimarkigas: "Ni havas denove problemon. Kiel ni devas fari por plibonigi la komunikadon inter homoj kies registraroj estas malamikoj unu de la alia?"

"Ni faras amuzan filmeton kaj disvastigas ĝin per ĉiu eblaj interretaj kanaloj. Plej bone ni uzas la anglan lingvon ĉar tiun oni ĉie komprenas", proponas Robert.

"La lingvo tute ne estas la problemo. Ekzistas sufiĉe da filmetoj en angla lingvo. Gravas precipe la enhavo. La traduko nuntempe estas tre facila afero. Tio funkcias jam aŭtomate", notas Tom.

"Jes, pensu nur al tiu korea popmuzika 'Gangnam style'. Ĝi enhavas plejparte koreajn vortojn. Sed mi ne pensas ke tiu kanto kun danco mondvaste famiĝis nur pro la teksto."

"Estis pro la ritmo kaj pro la komikaj ŝanceliĝantaj movoj de la aktoro."

"Respekto. Li certe ricevis kelkajn miliardojn klakojn kiel aplaŭdon."

Ingo ridetas: "Jes, ni faru ion tian. Eliza kaj Leona baraktas kiel frenezuloj antaŭ nia kontraŭmilita afiŝo. Kaj ni tuj havas milionojn adeptojn!"

"Kaj kiu komponas la melodion? Kaj ni ankaŭ bezonas plaĉan tekston, ĉu ne?", demandas Tom.

Bruno, unu de la novaj partoprenantoj, sin prezentas:

"Mi faros tion. La melodio ne estas la problemo. Pri tio mi certe sukcesos. Sed la teksto. Mi ne pensas fari

ĝin en la angla estas bona ideo. Ekzistas jam sufiĉaj anglaj kantoj."

"Kial? Ĉu en la germana? Nur ne tio!"

"Mi voĉdonas por preni la platgermanan."

Nun aperas multaj aliaj proponoj. Sed neniu ricevas aprobon. Finfine Briana diras:

"Ni faru tion en Esperanto!"

Ĉiu estas surprizitaj. Neniu ekzakte scias kion signifas tio. Briana alportas eksciton en la grupo kaj ne povas kaŝi misteran rideton:

"Tion vi mem devas solvi. Kolektu informojn. La venontan fojon vi certe scios."

# Esperanto

Tom estis vere tre diligenta. Li disdonas afiŝojn kun Esperanto-teksto.

**Tio estas nia mondo** [*5]

Kun plorado ni krias pri la perditaj vivoj,
La tero plenas je doloro kaj ĉagreno.
Militoj neniigas homan valoron,
Nia mondo estas bruligita sen motivo aŭ kialo.

La veneno de malamo dissemiĝas tra l' aero,
Homa frateco estas forgesita,
ĉio estas malsincera.
Korpoj kaj animoj detruiĝas en la batala bruo,
Ni ne povas lasi tion daŭri,
ĉar tio estas senĉesa fuŝo.

Ni sopiras al paco,
ĝin ni devas atingi,
Por la estonteco de nia mondo, ni devas lukti.
La infanoj venu, kantu en harmonio,
Neniam plu milito,
nur pacaj sonĝoj en nia animo.

"Mi nur ordonis al ChatGPT, ke ĝi skribu repon kontraŭ la milito el 3 strofoj po ok linioj en Esperanto. Al tio mi metis la titolon kaj la enhavon por la strofoj. Do, unue la plendo pri la multaj mortintoj, tiam la plendo pri la malamo kaj fine la sopiro al paco. La rezulto aperis tuj post unu klako."

"Kaj vi jam komprenas la tekston?", demandas Robert.

"Unue kompreneble ne. Sed Google tradukis ĝin por mi. La germana teksto estas sur la dorsa flanko de la papero. Mi ne scias bone kiel sonas la vortoj. Tion ni devas kontroli. Kaj mi trovis eĉ platformon kie roboto voĉlegas ankaŭ Esperantajn tekstojn. Sed ĉu tio estas ĝusta, mi ne volas juĝi."

Briana kapablas fari tion. Antaŭ unu jaron ŝi komencis mem lerni Esperanton. Tial ŝi komprenas la repon sen la traduko de la dorsa flanko.

"Tio estas bona laboro, Tom. Nun ni ĉiuj turnu la paperon!"

Tiam ŝi povas konfirmi, ke la traduko estas bona.

# Falĉi la gazonon

"Saluton, Leona", vokas Tom. Kompreneble li volas iomete fanfaroni pri siaj Esperanto-scioj antaŭ Leona.

"Buongiorno!", replikas Leona en la itala. Bob ne komprenas kaj simple nur diras "Hallo".

Tom kaj Bob venis por falĉi la gazonon. Ili iras kun la patro de Leona al la ĝardena domo kie staras la falĉilo. Ĝi estas maŝino kun elektra kablo.

"Nur atentu ke vi ne fortranĉas la kurenton", avertas ilin s-ro Berger kaj donas al Tom la rastilon kaj la balailon por la tranĉita herbo kaj diras:

"La fortranĉaĵon demetu apud la kompoŝto. Mi mem zorgos pri tio poste."

Leona alportas kolaon kaj malvarman akvon  kaj metas tion sur la terasan tablon. Ŝi deziras al ili ambaŭ multan ĝojon por la laboro kaj malaperas en la domon.

"Tion mi sciis. Tiuj dorlotitaj filinoj. Ili ne bezonas fari ion en la hejmo kaj poste Paĉjo veturigas ilin per aŭto", kritikaĉas Bob.

Tom provas protekti ŝin: "Vi ja tute ne scias, kion ŝi faras en la domo. Povas ja esti ke ŝi devas lavi la telerojn."

"Tion vi mem ne kredas, vi sonĝulo. Ŝi certe sidas malantaŭ la kurtenoj kaj observas kaŝe nian laboron", respondas Bob.

Nun Tom kaj Bob komencas la falĉadon. La spaco estas tre granda. Ili bezonas pli ol unu horon ĉar ili ankaŭ devas rasti la fortrancaĵon.

"Kiel mi soifas. Nun mi bezonas ion por trinki", diras Bob. Ambaŭ sidiĝas sur la teraso kaj ĝojas pri la trinkaĵoj kiujn Leona preparis. La patrino de Leona ankaŭ eliras el la domo. Ŝi dankas kaj donas la monon al ambaŭ laboristoj. Ŝia edzo pensis pri 15 Eŭroj por ĉiu. Tre bona poŝmono!

"Vi povas ankoraŭ resti ĉi tie kaj ripozi. Mi informas mian filinon por ke ŝi venu al vi. Leona ja devis hodiaŭ polvosuĉumi la ĉambrojn."

"Ĉu vi komprenas? Kion mi diris al vi!", opinias Tom triumfe al Bob.

# Amatoroj

Unu semajno rapide forflugas. Jam estas denove ĵaŭdo. Ĉiuj intense lernis Esperanton dum la pasintaj tagoj. Tial Briana ne necesas klarigi multon. Sed ŝi emfazas ke Esperanto estis kreita kiel facile lernebla lingvo por plibonigi la komunikadon inter la homoj.

La plej speciala trajto de tiu lingvo estas verŝajne sia neŭtraleco. Tio signifas, ke ĉiu parolanto de Esperanto unue devas mem lerni la lingvon. Se du homoj kun du diversaj gepatraj lingvoj volas komuniki, ili unue devas decidi, kiujn lingvon ili uzu. Ĉiu decido uzi unu de tiuj lingvoj malfavorus la parolanton de la alia.

Tamen dum multaj jaroj estis ŝanĝiĝo rilate al la trajto 'neŭtraleco' ĉar intertempe jam ekzistas konsiderinda nombro de homoj, kies ambaŭ gepatroj regas Esperanton. Tial ilia gepatra lingvo estas Esperanto.

Eliza petas parolon kaj voĉlegas la tekston de la rep-kanto. Tion ŝi faras sen problemoj kun ĝusta prononcado. Ankaŭ la emfazo de la silaboj estas ĝusta. Esperanto estas ja parolata laŭ simplaj, klaraj reguloj. Kaj ĉar por ĉiu litero apartenas nur unu fonetika valoro, oni eĉ povas tuj senerare skribi la tekstojn, kiujn oni aŭdas.

Ankaŭ Bruno estas bone preparita. Li komponis melodion, kiu jam iugrade konvenas al la teksto. Por plibonigi la melodion kaj la ritmon, li fiksas novan renkontiĝon kun Leona kaj Eliza. Li mem ankoraŭ ne bone regas Esperanton.

"Ĉu vi jam havas ideojn por la danco?", demandas Briana.

"Kion vi pensas pri frapa dancado? Sed, ne, tiam Leona kaj Eliza bezonus specialajn ŝuojn."

"Kaj se ili tro laŭte klakas, neniu povas kompreni la kantatan tekston."

"Devas esti moderna danc-stilo. Sed neniam kiel baleto. Vi povas ja moviĝi kiel robotoj. Eventuale tio konvenas al la ritmo."

"Kaj, kiu preparas la fonon? Ni ja minimume bezonas grandan afiŝon aŭ bildon, ĉu ne?", notas Ingo.

"Tio ankoraŭ ne sufiĉas. Kiu filmas la scenojn? Kiu povas prilabori tion per komputilo? Mi pensas ke estos ankoraŭ multe por fari!", opinias Birgit.

# Provludo

"Mi malfruos. Ĉu vi povas transporti min hodiaŭ al la junularcentro, Paĉjo? Sed antaŭen ni devas ankoraŭ veturi al Eliza. Ŝi ja ankaŭ volas kunvojaĝi", demandas Leona.

"Kial tio? Hodiaŭ ja ne estas ĵaŭdo. Ĉu tio signifas ke mi ankaŭ ŝoforu vin je mardo?

"Nur por kelkaj fojoj. La venontan mardon mi prenos mian biciklon. Sed hodiaŭ estas vere tre malfrue."

Leona kaj Eliza havas rendevuon kun Bruno. Temas pri la repo. Kanti kaj danci. Je la provludoj Bruno volas plibonigi sian muzikan akompanadon. Ĉio devas esti bone kunordigita.

S-ro Berger denove cedas al la petoj de sia filino kaj stiras la aŭton el la garaĝo.

"Nun, ek! Eniru! Kie loĝas Eliza? Kaj, kion vi faras hodiaŭ tie en la junulara centro?"

"Montostrato 23". Leona ne diras plu, ĉar ŝi jam koncentriĝas al la paĝo kun la Esperanto-teksto. Ŝi estas plene fokusita, tial ŝia patro ne riskas ĝeni ŝin kaj ne plu demandas. Li ja estas nur la ŝoforo.

Alveninte je la junulara centro ambaŭ knabinoj kuras al la ĉambro por provludoj en la dua etaĝo. Bruno jam atendas ilin. Li komprenoplene diras:

"Ne gravas. Estas ja nur dek minuta malfruiĝo. Ĉifoje sen puno."

Bruno ne planis ĉiun mardon veni al la junulara centro. Lia tempo estas ja limigita. Ankaŭ hodiaŭ li devas neglekti sian taskojn por la lernejo. Sed promeso estas promeso. Li nur esperas, ke hodiaŭ la provludo sukcesus.

Unue la teksto estas parolata kune kun la muziko. La unua strofo ne kaŭzas problemojn, sed je la dua li komencas ŝviti. Ĉi tie li devas ŝanĝi la ritmon. Por tio li uzas la komputilon, kiun li kunportis.

"Vi povas ripozi nun. Mi bezonas ankoraŭ plian tempon ĉi tie."

Eliza kaj Leona ĝojas pri la interrompo kaj alportas freŝajn trinkaĵojn. Ili sidiĝas je la fenestra flanko kaj observas kiel Bruno faras sian laboron.

"Ĉu li ne aspektas ĉarme?", flustras Leona, "Rigardu. Kiel beleta la pulovero!"

Eliza ne povas subpremi etan pikmokadon:

"Aha! Mi ĉiam pensis ke vi nur interesiĝas pri Tom. Li verŝajne tuj vestus sin same, kiam mi rakontas al li kion vi favoras."



Bruno

"Vi ja nur estas ĵaluza, ĉar Tom ŝatas nur min", replikas Leona.

Bruno ne rimarkas, ke oni intense observas lin. Li daŭre koncentriĝas pri la pliboniĝo de la melodio. Finfine li sukcesas kaj la provludo povas daŭri.

Post unu horo ili devas konstati, ke ili verŝajne bezonus pliajn renkontiĝojn. Ĉio ne estas tiel facila.

Entute la tri kunvenas ankoraŭ kvar fojojn. Poste ĉio funkcias. La sekvantan ĵaŭdon estos la prezentado de la repo antaŭ la tuta grupo. Ankaŭ la aliaj taskoj trovis siajn respondeculojn. Tom estos la kameraisto kaj Bob preparos kune kun Robert la prezentadon por la interreto.

Sed por Eliza kaj Leona venas nun la plej granda problemo. Kiajn vestaĵojn ili devas porti? Gravas ja certe la ĝustaj kostumoj.

Ili pasigas horojn en siaj ĉambroj antaŭ la spegulo kaj provas ĉiajn robojn, jupojn, pantalonojn, bluzojn kun kaj sen tukoj, k.t.p.

La gepatroj ĝuas privatajn modo-prezentaĵojn. Oni bezonas iliajn konsilojn. Sed la patro de Leona ne riskas kritiki iun vestaĵon. Li jam divenas, kion lia filino volas nun.

"Ĉu vi veturigas vin al la urbo? Ni ja havas nenion taŭgan por porti, Paĉjo!"

# Prezentado

Ah! Hura! Nekredeble! Respekto! Aplaŭdo! Gratulon! Tio estas nur kelkaj esprimoj, kiuj sekvas la prezentadon.

Hodiaŭ eĉ la gepatroj de Leona venis al la junulara centro. Ankaŭ ili brilas pro entuziasmo. Eliza kaj Elona ĝojas kaj afable diras dankon al Bruno. Li profesie kliniĝas kaj ricevas grandegan aplaŭdon. Tiam Leona kuras al sia patro kaj kisas lin sur la vangon.

"Denove koran dankon pro la beleta robo!"

"Nu, ja, mi jam vidas. Tio ja bone valoris", grumblas ŝia patro.

Tom filmis ĉion, sed ne estas kontenta.

"Tio nur taŭgas por ni. Por la prezentado en la reto ni bezonas pli bonan materialon. Krome mankas ja la granda afiŝo."

Kompreneble, li pravas, sed la plej granda parto estas farita.

Briana prokrastas tiun parton de la projekto al la venonta kunveno.

"Hodiaŭ sufiĉas. Mi mendas trinkaĵon por ĉiu. Ingo, ĉu vi povas kolekti la dezirojn?"

Do, la resto de la kunveno pasas per simpla babilado. Briana uzas la tempon por klarigi la celojn de la grupo al la gepatroj de Leona. Kaj la knabinoj gaje flustras pri la striita pulovero de Bruno, kiu ne komprenas kial ili tiel stulte ridetas. Sed li fakte rimarkas, ke temas pri li.

Bob kaj Tom ne zorgas pri tio. Ili rigardas streĉite la registritan filmon, kiun ili intertempe transŝutis al la komputilo.

Tom direktiĝas al ambaŭ knabinoj:

"Venu ĉi tien kaj vidu. Ĉi tie li devas pli proksime iri al la kamerao kaj rigardi rekte antaŭen. Tion ni devas ankoraŭ ekzerci."

Briana subtenas Tom: "Jes, kaj tiam precipe gravas la mieno. Tiam vi povas eĉ interrompi la dancadon."

Nun ankaŭ la aliaj venas kaj spektas la registritan filmon denove.

"Mi pensas hodiaŭ ne plu estas laboro", plendas la patro de Leona kaj adiaŭas sin kune kun sia edzino. Ŝi ankoraŭ notas:

"La venontan fojon ni ne devas veni ĉi tien ĉar tiam ni simple spektas la filmon per la interreto. Vi certe sukcesos. Amuziĝu!"

Jes, ne necesas ke la gepatroj venas. Post nur unu semajno la filmeto estas enretigita, do mondvaste videbla. Briana informis ĉiujn esperantistojn, kiujn ŝi konas. Kaj ŝi jam ricevis la unuan reagon el Uzbekio.

| | |
|---|---|
| Titolo: | **Tio estas nia mondo** |
| Teksto: | ChatGPT |
| Muziko: | Bruno |
| Kantado/Danco: | Eliza & Leona |
| Kamerao: | Tom & Bob |
| Reĝio: | Ingo & Briana |
| Lingvo: | Esperanto |

# Fontoj

06/08/2023

[*1]
https://tatoeba.org/de
Satz #8447521 von Esperantostern

[*2]
https://www.craiyon.com/
AI Art Generator

[*3]
https://www.wnoz.de/nachrichten/deutschland-und-die-welt/politik/international/zahl-der-toten-durch-bewaffnete-konflikte-verdoppelt-113508.html

[*4]
https://www.grin.com/document/44266
Zur Konstruktion des Freund-Feind-Schemas in Printmedien der NS-Zeit

[*5]
https://chat.openai.com

# Rimarkoj pri Craiyon

La bildoj, kiujn vi trovas en tiu rakonto, estas generitaj de la artefarita intelekto (AI) de la platformo Craiyon. Ĉi tie mi skribis la mallongajn priskribojn kiel ordonojn en la angla lingvo kaj post kelkaj sekundoj ĉifoje aperis naŭ bildoj el kiuj mi elektas unu.

Jen tri ekzemploj por la ordonoj (angle: prompt):

Por ricevi bildon pri Tom mi skribis:
**15 year old boy, round face, stubbly hair**
(15 jaraĝa knabo, ronda vizaĝo, stumpa hararo)
La rezulto rilate al la hararo ne estis bona, sed ne gravis, mi trovis unu taŭgan bildon por mia protagonisto.

Por Eliza mi skribis:
**15 year old girl, short and black hair, smiling**
(15 jaraĝa knabino, mallonga nigra hararo, ridante)

Kaj la bildo pri milito venis post tiu priskribo:
**modern house destroyed by bombs**
(moderna domo, detruita per bomboj)

Mi ne ŝanĝis la bildojn, sed nur transformis ilin al la griza versio (sen koloro).

# Kolofono

**Titolo**
Tio estas nia mondo

**Originala titolo**
Das ist unsere Welt

**Versio 1.2**
1-a Eldono, 2023

**Aŭtoro**
Erik Tantal, alinome Klaus Friese

**Traduko**
Klaus Friese

**Aŭtoraj rajtoj**
© Klaus Friese, Hamburg

**Retpoŝto**
friese@esperanto-hamburg.de

**Titolbildo**
AI-generita bildo de Craiyon

**Hejmpaĝo**
esperanto-klaus.de